CARLAND

# Cross


M. OLEFFE O. GRENSON


## 5 MISTERO EN LAGO NESS

### 2-a parto. *La tombejo sub la lago*




ESPERAĴO

**Originala titolo:** *Carland Cross 5: La Mystère du Loch Ness II. Le cimetière sous les eaux*
**Aŭtoroj:** Michel Oleffe, Olivier Grenson
**Jaro de originala publikigo:** 1995

Cifereca eldono de Studio Esperaĵo, novembro 2025
**Esperanta traduko kaj kompostado:** Mikaelo Kastro






«La filo de Odino», je la 8-a vespere. Vikinga dramo de Heribert Phipps.



ĈU VI LEGIS LA PROGRAMON, SINJORINO?
AŬSKULTU! DRAMO DE DELIRA INTENSECO, KIU REVIVIGAS LA EPOPEON PRI LA KONKERO DE SKOTLANDO FARE DE VIKINGAJ HORDOJ. HERIBERT PHIPPS, LA EKSTERORDINARA KOMPONISTO DE «LA BELA PRINCO KARLO» DIREKTOS LA ARDAN «LA FILO DE ODINO».
KELKAJ HOMOJ ESTAS TRO KURAĜAJ, MI TION CERTIGAS AL VI...!
ĈIIIT! JEN LA DIREKTORO!
CLAP CLAP CLAP CLAP CLAP CLAP CLAP
CLAP CLAP CLAP CLAP CLAP CLAP CLAP CLAP
VE AL SINJORO CROSS, VE AL ANDY.
PROVU NE PENSI PRI ILI, MILDRED. ĜUU LA OPERON.


TOC
TOC
TOC
Odino... princo de fulmoj!
KIA AĈAĴO!
MISTERO EN LAGO NESS
2-A PARTO
LA TOMBEJO SUB LA LAGO
Atenton, Skotlando! Viaj idoj verŝas sian sangon sur niajn drakŝipojn!
Kompaton, sinjoro, kompaton!
SED... SED... SED... HELPOOON!!!
47.



DIO MIA!
YYAAAAAHA
MIA MUZIKO NASKIGAS VIVON! HERIBERT, VI ESTAS DIO!
PAN
?
48.


SED... KIO ESTAS TIU DIABLAÎO?!
KUNIGU POLICANOJN KAJ KONTROLU ĈU ESTAS IU VUNDITO EN LA TEATRO.
VIKING DRAMA BY HERIBERT PHIPPS
KIO OKAZAS, SINJORO SUPERINTENDANTO?
SE MI SCIUS!
TEMAS PRI SORĈAÎO!
KION FAROS LA POLICO?
ONI VOLIS SABOTI MIAN OPERON!
RESTU EN VIA LANDO, ANGLO! VI ALPORTAS NUR PROBLEMOJN!
HOU HOU!
HOU HOU
SUMMER, SCIIGU LA OFICEJON PRI TIO, KAJ ORDONU, KE LA ARMEO ESTU PRETA.
HOU HOU! HOU
POC
HOU
SE NI HAVUS CROSS-ON ĈE NI!
KIE LI POVAS ESTI ĈI-MOMENTE? VE!


MAJSTRO, KION VI FARAS?
FIAĴON. MI PRISERĈAS LA POŜOJN DE LA MORTINTO.
FRRSHH
HA, JEN!
MI TROVIS LIAJN ALUMETOJN KAJ ŜNURON... HELPU MIN DISŜIRI LIAJN VESTOJN POR FARI SPECON DE TORĈO.
50.


DIO MIA, MAISTRO! NE ESTAS PLI DA ŜNURO!
SUPRENGRIMPI ESTAS SENUTILE. MI VIDAS AKVOKIRLON. NI SALTU!
AAAAAAAH
TIO ESTAS FRENEZAĴO!
NI NE HAVAS ALIAN ELEKTON! SE NI ESTOS SUFIĈE BONŜANCAJ, AKVO MILDIGOS NIAN ENFALON.
51


EN INFERO! NI ESTAS EN INFERO!
TRANKVILIĜU, ANDY. NUR VENU RIGARDI!



MIRINDE! LA PLEJ GRANDA VIKINGA NEKROPOLO IAM AJN ELTROVITA. LA SEKVANTOJ DE RAGNAR ESTAS KUNIGITAJ ĈIRKAŬ LA REĜA DRAKŜIPO!
KOMPATINDA LORDO PORTLETT, LI ESTIS TIOM PROKSIMA AL SIA CELO.
NU, JEN LA VERA KURIOZAĴO!
LA AKVO FOJFOJE ALTIĜAS. DUM FORTAJ PLUVOJ, LA DRAKŜIPOJ SENDUBE EKFLOSAS, KAJ ILI MALPROKSIMIĜAS DE SIAJ RESTEJOJ. MI NE MIRAS, KE UNU EL ILI KOLIZIIS KUN NIA BOATO LA PASINTAN NOKTON!
NU... ĈU LA APEROJ DE LA MONSTRO DE LAGO NESS ESTIS KAŬZITAJ DE LA SUPRENIRO DE LA DRAKŜIPOJ?
TIO SIGNIFAS, KE EKZISTAS VOJO AL LA SURFACO. SED TIO VERE NE ESTAS LA SOLA MISTERO DE ĈI TIU LOKO...
IU HOMO BONTENAS ĈI TIUN TOMBEJON!
?!
53


TIO KONFIRMUS LA HIPOTEZON PRI VOJO, KIU KONDUKAS SUPREN!
SENDUBE, MIA KNAB'! NE EBLAS IMAGI, KE LA TOMBEJOGARDISTO PORTIS ĈIUJN SIAJN MATERIALOJN LAŬ LA VOJO, KIUN NI IRIS.
?
VI!
54.


MIZERULOJ! VI MAKULIS TIUN ĈI TOMBON PER VIA SAKRILEGIA ĈEESTO!
LA MALBENO DE RAGNAR TRAFU VIN!
MALBENO FALU SUR VIN!
RÂÂÂÂÂ
CROÂÂÂ
VENU AL MI, GALAHAD!
AAAAAAH
55.


AAAAA
MI ESTAS LA SERVISTO KAJ LA GARDISTO!
ĈESU JAM, SPOTTY! VI ESTAS TUTE FRENEZA!
56



RAGNAR, JEN VIA FILO!
BARUOOO
AAAAAAAA
57


NE MALESPERU, ANDY. NI FARU LA PROVON: SE LA ŜIPOJ POVAS SUPRENIRI, ANKAŬ NI. ĈU NE?
SED... NI ELMETOS NIN AL LA RISKO DRONI!
JES, SED MI PREFERAS FARI KLOPODON OL MORTI KIEL RATO.
ĈI TIE ESTAS MANĜAĴOJ POR KELKE DA TAGOJ, KAJ NI HAVAS LA ILOJN DE SPOTTY. NI KLOPODU SURAKVIGI DRAKŜIPON!
DUM PROKSIMUME DEK TAGOJ DA MALFACILA LABORO, LA DETEKTIVA DUOPO STREBIS MALPEZIGI UNU EL LA VIKINGAJ ŜIPOJ...
ILI RUDIMENTE RIPARIS LA ŜIPŜELON PER LIGNO KAJ NAJLOJ ELPRENITAJ EL ALIAJ DRAKŜIPOJ.
ILI KALFATRIS LA ŜIPON PER MIKSAĴO EL ŜTOFO KAJ GUDRO. LA ŜTOFON ILI DEŜIRIS DE SIAJ PROPRAJ VESTOJ, LA GUDRO VENIS EL LA REZERVO DE SPOTTY.
MALGRAŬ TIO, KE TIUJ DU LACEGAJ VIROJ KLOPODIS PUŜI LA PEZAN ŜIPON EN LA NIGRAN AKVON DE LA LAGO, ĈIUJ PROVOJ ESTIS VANAJ.
RESTAS AL NI NUR UNU ESPERO: KE LA AKVO KOMENCOS ALTIĜI.
58



NI TOSTU JE LA CERBEGO DE WADE, KARA MEDWENNA. NIA ĈI-VESPERA TESTO EN INVERNESO ESTIS SUKCESA. EKDE NUN, NI POVOS SENDI NIAJN VIRTUALAJN BILDOJN AL IE AJN, TUTE SEN ZUMADO...
KARA MEDWENNA, NE ESTOS OBSTAKLOJ POR KE VI FINFINE «PILOTU» LA MENSOJN DE VIAJ SAMLANDANOJ. KOMENCIĜIS LA TRIUMFONTA RIBELO DE SKOTOJ KONTRAŬ ANGLOJ!
PARDONU, MURDOCK, SED MI SUSPEKTAS TION, KE VI POSTIRAS ALIAJN CELOJN, KIUJ NE RILATAS AL LA LIBERIGO DE MIA LANDO.
HO VE, MEDWENNA. VI SCIAS KIOM FERVORE MI ADOPTIS VIAJN IDEALOJN, KAJ KIOM ENERGIE MI LABORIS POR PLIPERFEKTIGI LA APARATOJN DE NIA AMIKO WADE. ĈU VI EKDUBOS NUN, KIAM NI ESTAS SUKCESONTAJ?
PRECIPE NUN, KIAM CARLAND CROSS NE POVAS DETRUI NIAN PROJEKTON! HA HA!
VI PRAVAS, MURDOCK. LA SENĈESA PLUVO DIFEKTAS AL MI LA SPIRITON...
PLUVO, PLUVO KAJ REFOJE PLUVO! KAJ KIAM NE PLUVAS, APERAS NEBULO. KAJ KIAM NE ESTAS NEBULO, VENAS VIKINGOJ! NU, KIA VILAĜO!
TRANKVILIĜU, MARMADUKE.
59


ANDY
ANDY
ANDY
ANDY, ANDY!
KIO OKA-ZAS?
AKVO ALTIĜAS. NI PUŜU LA DRAKŜIPON!
60



TIUJ KAVERNOJ ESTAS SENFINAJ.
ŜAJNE LA KURENTO PLIRAPIDIĜAS.
AŬSKULTU TIUN BRUEGON...!
A... A... ABISMO!
TENU VIN FORTE, ANDY!

ĈE LA BORDO DE LAGO NESS...




KELKAJN HOROJ POSTE...
SINJORO CROSS, ANDY, NEKREDEBLE!
ANDY, ANDY! MI TIOM ĜOJAS!
VI MALBONE ASPEKTAS, SINJORO CROSS. MI FAROS HAGISON POR VI.
WINGFIELD, NE DISVASTIGU LA NOVAĴON. ONI BEZONAS KREI MAKSIMUMAN SURPRIZON.
KAJ KIAL NE?
ĈAR NI HAVAS LA RESPONDON POR ĈIUJ STRANGAJ FENOMENOJ OKAZINTAJ EN LA AREO DUM LA LASTAJ SEMAJNOJ.
SUB LA ŜIPKONSTRUEJO DE MEDWENNA McGUIRE ESTAS KAVERNARO, KIU ENTENAS STRANGAN INSTALAĴON. LA TIEA TEKNOLOGIO NE ESTAS KONATA AL MI, SED ŜAJNE ĜI ESTIS KREITA POR ELSENDADO DE BILDOJ. ONI NEPRE HALTIGU TIUJN KRIMULOJN ANTAŬ OL ILI SEMOS TERURON EN LA LANDO.
KION VI PROPONAS?
ATAKON, WINGFIELD! TUJ!
63.

EN LA DOMETO...



NI DENOVE BONFARTAS, ANDY. WINGFIELD PROBABLE JAM KUNIGIS LA TRUPON.
KIA MALFELIĈAĴO! VI APENAŬ POVAS TENIĜI SUR VIAJ KRUROJ, VI RIFUZIS LA MANĜAĴON DE JOSEPHINE, KAJ VI JAM EKIRAS AL «MILITO»! VE!
SALUTON, CROSS. ĈIO ESTAS PRETA... HMM, HMM. ĈU MI SENSAS LA BONODORON DE HAGISO?
EN ORDO. LA UNUA TAĈMENTO TRUDOS SIN EN LA ŜIPKONSTRUEJON. ALIA TAĈMENTO KOMANDITA DE ANDY ENIROS SUBTERE LAŬ LA VOJO DE LA RUINOJ. LA TRIA TEAMO ĈIRKAŬBAROS LA HAVENON DE LA LAGO. NI NE PERMESU AL ILI ESKAPI.
NJAM!
SINJOROJ, MEMORU LA JENON: KELKAJ VIDAJ ILUZIOJ PROVOS HALTIGI VIAN ANTAŬENIRON. ESTU ATENTAJ!



BIIIIIIIIIIP
KIO ESTAS TIO?!
BLAM
MIL DIABLOJ! SED... ONI ATAKAS NIN!
JEN LA MAŜINEJO!
REVENU! TEMAS PRI ILUZIAJ BILDOJ!
HA HA HA! NUN LA ALIA GRUPO ĈE LA ĈEFA ENIREJO... SED... KIO?!
CROSS! TIU DEMONA CROSS! TIO NE EBLAS!
DIO MIA!



WADE, KUNIGU ĈIUJN DOKUMENTOJN KAJ PRETIGU LA AVIADILON! MED, ORDONU AL VIAJ VIROJ EKPAFI!
KAJ MI SENDOS AL TIUJ SINJOROJ KELKAJN BILDOJN, KIUJN ILI NENIAM FORGESOS!
EK, MALŜALTU LA APARATOJN, SED NE DETRUU ILIN!
DEVAS ESTI IU VOJO KONDUKANTA EN LA ŜIPKONSTRUEJON!
ONI MALŜALTIS ĈION, SINJORO.
JEN ŜTUPARO, SINJORO WHITE!
BANG
BANG
DAMNE! LA ELSENDILOJ NE PLU FUNKCIAS!
ONI NE POVOS REZISTI DUM MULTE DA TEMPO. NI KUNIĜU KUN WADE!


LEVU LA MANOJN!
MURDOCK?
ADIAŬ, CROSS.
CARLAND, ATENTU!
CARL...
PAW PAW
67.


SKOTLANDO, CARLAND... MI NE VOLIS...
MAJSTRO, NI PRENIS LA SUBTERAN ETAĜON! TIO...
JES, SED TIU DIABLA MURDOCK ESKAPIS UNU PLIAN FOJON...
MURDOCK?
MEDWENNA NE VENOS KUN NI. EKFUNKCIIGU LA AVIADILON, WADE.
VROAA
!



VVRRROOOOooo
SED... ILI ESKAPOS! PAFU, PAFU! MI PETEGAS!
PAN
PAN
PAN
PAN
HA HA HA! TRO MALFRUE, SINJOROJ! MURDOCK SUKCESE ESKAPIS UNU PLIAN FOJON! HA HA HA HA!
WINGFIELD, PREFERE SCIIGU LA REĜAN AERFORTON PRI TIO, KE NEREGISTRITA AVIADILO EKFLUGIS AL LA NORDO. BEDAŬRINDE, NUN NI POVAS FARI NUR TION!
69


LA SEMAJNOJ POSTAJ AL TIUJ TRAGEDIAJ OKAZAĴOJ ESTIS PLENAJ DE SURPRIZOJ. LA APARATOJ TROVITAJ EN LA KAVERNOJ PROKSIMAJ AL LA ŜIPKONSTRUEJO ESTIS MALMUNTITAJ KAJ SENDITAJ AL MANĈESTRA LABORATORIO.
TEMIS PRI KOMPLEKSA SISTEMO EL KAMERAOJ, ELSENDILOJ KAJ AGORDEBLAJ MAŜINOJ, KIUJ KAPABLIS ELSENDI BILDOJN AL HOMOJ SUBMETITAJ AL TIU TEKNOLOGIO, PER STIMULADO DE LA MENSA FREKVENCO.
1 2 4 5 6 7 8 9 10
ONI MALKOVRIS, KE MEDWENNA McGUIRE SUBTENIS ĈI TIUN MAKIAVELAN PLANON ĈAR ŜI ESPERIS VEKI SKOTAN NACIISMON, TIEL KE IUTAGE ŜIA LANDO ATINGUS STATON DE SENDEPENDECO.
ŜI ESTIS TROMPITA DE MURDOCK KAJ LIA KOMPLICO. TIU DUOPO POSTIRIS MALPLI RESPEKTINDAJN CELOJN. LA METROPOLA POLICO NE PERMESIS LA PUBLIKIGON DE LA VERAJ PLANOJ DE TIU KRIMULA PARO.
ARKEOLOGOJ BEDAŬRIS LA PEREON DE LORDO PORTLETT, SED ILIA DOLORO ESTIS MILDIGITA DE LA AMPLEKSEGA MALKOVRO. LA BRITA MUZEO DECIDIS MALFERMI EKSPOZICIEJON NOMATAN «LA TOMBEJO SUB LAGO NESS».
CARLAND CROSS REVENIS EN LONDONON, KIE LI PER LABORO PROVIS FORGESI LA TERURAJN SPERTOJN OKAZITAJN EN SKOTLANDO.
EN LA INTERTEMPO INTER DU ESPLOROJ («LA PENDUMITO DE BUCKINGHAM» KAJ «LA SENKAPA MORTINTO DE SEVEN DIALS»), LI INFORMIĜIS PRI LA NOVAĴOJ RILATAJ AL LAGO NESS. MURDOCK ESTIS ANKORAŬ NETROVEBLA.
JOSEPHINE AKOMPANIS SINJORINON STONE AL LONDONO, KAJ LA DU KURAĜAJ VIRINOJ KLOPODIS GAJIGI LA FAMAN DETEKTIVON PER SIAJ SPECIALAJ DELIKATAĴOJ. TIEL PASIS SES MONATOJ.
TAMEN, UNU VESPERON...
DRING
70


LORDO BASINGSTOKE, WINGFIELD! KIA HONORO!
CROSS, MI ALPAŜOS REKTE AL LA AFERO: LA METROPOLA POLICO VOLAS, KE VI ZORGU PRI TRE GRAVA KOMISIO.
LA ESPLORO PRI LA AFERO DE LAGO NESS ESTAS OFICIALE FERMITA. TAMEN, RESTAS KELKAJ NERESPONDITAJ DEMANDOJ. LA KONFISKITAJ APARATOJ ESTIS PROTOTIPOJ.
ONI CERTAS, KE TIUJ FIULOJ EKKONSTRUIS NOVAN GRANDEGAN ELSENDILON EN IU LOKO, SED NI SCIAS PRESKAŬ NENION ALIAN.
ĈU VI VESPERMANĜOS ĈE NI, SINJOROJ? ĈI-VESPERE ONI MANĜOS SANGOKOLBASOJN!
ĈU VI DO TIMAS, KE LA TUTA AFERO RIPETIĜU GRANDSKALE, EN ALIA LOKO?
JEN DOSIERO ENTENANTA ĈIUJN INFORMOJN, KIUJN MIAJ LABORISTOJ POVIS EKHAVI PRI LA KAPABLOJ DE TIU BILD-ELSENDILO. SE VI POVUS...
MI SENTAS MIN FLATATA DE VIA KONFIDO, MIA LORDO.
ĈU VI ĈIUJ MANĜOS POMBENJETOJN?
HO, JES!


TÛÛÛT
TÛÛÛT
REIRI AL SKOTLANDO POST ĈIO, KION ONI TRAPASIS TIE! KIA FRENEZAĴO! ĈU MURDOCK NE TURMENTIS VIN SUFIĈE, SINJORO CROSS?
JES, ĜUSTE, SINJORINO STONE!
PASSENGERS
ANDY, NI PRIDEMANDU LA VILAĜANOJN DENOVE. NUN NI SCIAS MULTE PLI, KAJ MI VERE SCIVOLAS PRI LA SIMPTOMOJ, KIUJ AKOMPANAS LA BILD-ELSENDOJN.
HA, JEN ICHABOD!
WAY OUT
JEN LA AROJ DE SKOTAJ ĴURNALOJ, KIUJN VI PETIS, SINJORO CROSS. LA ARĤIVO DE INVERNESO VOLONTE KUNLABOROS EN VIA ESPLORADO.
DANKON, WILLIS!
LA LABORO ESTIS PENIGA. CARLAND CROSS FARIS ĈION EBLAN CELANTE LA TROVON DE AJNA DETALO, KIU POVUS SIGNIFI MALGRANDAN INDICON.
LA METROPOLA POLICO DEFILIGIS ATESTANTOJN UNU POST ALIA. POLICAJ TRUPETOJ RASTIS LA REGIONON.
UNU VESPERON, INSPEKTISTO McDOWELL ALPORTIS KUN SI KURIOZAN GRANDULON.
MI DIRIS AL McDOWELL, KE MI EGE EKTIMIS... VILAĜO TIEL SENHOMA, SEN KIALO... TIO TIMIGUS IUN AJN, ĈU NE?
VILAĜO SENHOMA?!


JES, GLUTT LODGE. VILAĜO EN LA NORDA EKSTREMO, INTER THURSO KAJ HELMSDALE, PRESKAŬ NENIU LOĜAS TIE. DE TEMPO AL TEMPO MI DEVAS IRI TIEN PRO MIA LABORO; MI LABORAS POR FIRMAO DE VISKIOJ.
LABORI POR VISKIA FIRMAO... NU, KIA BELA LABORO!
DUM MIA ANTAŬA VIZITO, MI RIMARKIS KE LA VILAĜANOJ ESTIS JAM IOM STRANGAJ. ILI VIDIS «AĴOJN» EN LA ĈIELO. UNU VESPERON, LA PREĜEJA ORGENO EKSONIS. LA VILAĜANOJ FORTE EKTIMIS; LA PASTRO MORTIS DU JAROJN ANTAŬE KAJ NENIU KURAĜIS KONTROLI LA PREĜEJON...
KIO OKAZIS?
MI ESTIS DRINKINTA IOMETE, VI KOMPRENAS... NU, KAJ MI ALPROKSIMIĜIS AL LA PREĜEJO. NENIU ESTIS ĈE LA ORGENO, TAMEN EL ĜI JA ELIĜIS TIU INFERA MUZIKO!
ĈIUJ VILAĜANOJ FORIRIS, EĈ LA TAVERNESTRO!
GLUTT LODGE? ĈIO HAVAS MULTE DA SENCO.
EĈ NE UNU TAVERNO EN LA VILAĜO! DIO MIA, TERURE!
POSTE, DUM LA NOKTO...
MI OPINIAS, KE LA INDICOJ AKORDAS, JUNA VIRO.
73.




MI VENIS AL SIMILA KONKLUDO NUR PER LEGADO DE PLURAJ ATESTOJ KAJ ĴURNALAJ ARTIKOLOJ. LA LOKA ĴURNALO DE THURSO PUBLIKIGIS KELKAJN ARTIKOLOJN, BEDAŬRINDE MALPROFUNDAJN, PRI LA OKAZAĴOJ KIUJ INTERESAS NIN. TAMEN, ESTAS PLI DA INFORMO...
Pentland
Durness
Thurso
John
Tongue
Wick
Glutt Lodge
Lochinver
Lairg
Brora
Ullapool
Dornoch
Minch
Moray Firth
Kinlochewe
Dingwall
Nairn
Elgin
Inverness
Culloden
Portree
Shieldaig
Plockton
Dufftown
Ballindalloch
Loch Ness
Grantown-on-Spey
Newtonmore
Mallaig
Braemar
Balmoral
Fort William
Grampian Mountains
Blair Atholl
Pitlochry
Tobermory
Glencoe
Rannoch Station
Forfar
GLUTT LODGE ESTAS LA SOLA LOĜATA VILAĜO EN SENHOMA AREO, KIU ETENDIĜAS LAŬ CENTOJ DA KVADRATAJ MEJLOJ. POST LA FORIRO DE ĈIUJ VILAĜANOJ, TIU GRANDA PARTO DE LA ALTAJ LANDOJ ESTAS NUNTEMPE EKSTER LA HOMA RIGARDO.
Glasgow
MI PETIS, KE LA BRITA AERONAŬTIKA ASOCIO FARU ESPLORON PRI LA AVIADILO DE MURDOCK: GLUTT LODGE ESTAS LA SOLA LOKO, AL KIE ĜI POVIS ALVENI NERIMARKITE. SE ENKALKULI LA OROGRAFION, LA AERKORIDOROJN KAJ LA AŬTONOMION DE LA APARATO, TIU AKVOAVIADILO PROBABLE SURIĜIS SUR UNU EL LA TIEAJ LAGETOJ.
Ben Griam
Dalnawillan Lodge
Ben Alisky
Stemster Hill
ĈU VI PENSAS, KE LA SEKRETA ELSENDILO ESTAS KAŜITA TIE?
Glutt Lodge
Loch Breac
Loch Dubh
Cnocan Conachreag
Badanloch Forest
Loch Arichlinie
Lochside
Knockfin Heights
Achentoul
Badanloch Lodge
Kinbrace
Dunbeach Water
Loch Mor
Latheronwheel
JES JA. MURDOCK INTENCE «PURIGIS» TIUN PRESKAŬ SENHOMAN AREON POR PRETIGI KRIMON, KIUN NUR FIULO KIEL LI KAPABLAS PLENUMI.
KION FARU NI, DO?
NI ĈIRKAŬRIGARDU! MORGAŬ NI EKIROS FRUMATENE. BONAN NOKTON, MIA KNAB'.
74



PÔÔÔ
674121
LA STACIO ALTNABREAC. NI ALVENIS, ANDY!
ALTNAB
RIGARDU! ONI DIRUS, KE ESTAS LUMO TIE!
75.


JEN RUINOJ DE MALNOVA ABATEJO. NUR RESTAS LA ABSIDO.
MI VIDAS NENIUN LUMON. TIU LOKO ESTAS TUTE DEZERTA, ANDY.
TAMEN, MI POVUS ĴURI, KE...
GLUTT LODGE!
ĈIT, ANDY! SILENTON!


ĈU VI AŬDAS TION?
JES. TIO ESTAS ORGENA MUZIKO.





EKZAKTE TIEL, KIEL MI PENSIS.
MAJSTRO, VENU VIDI ĈI TION!
RIGARDU TIUJN TIMIGAJN FORMOJN!
NUN MI KOMPRENAS KIAL LA VILAĜANOJ EKTIMIS TIOM MULTE! SEKVU MIN, ANDY!



LA ELSENDILO GENERAS TIUJN STRANGAJN FORMOJN. ĜI UZAS FREKVENCOJN, KIUJ VIBRIGAS LA TUBOJN DE LA ORGENO. TIEL ESTIĜAS TIU HAZARDA MUZIKO. LA NEKONATA ORIGINO DE LA MUZIKO KONTRIBUIS AL ĈI TIU HARSTARIGA ETOSO.
SED, KIAL?
GLUTT LODGE ESTAS STRATEGIA LOKO. EBLE LA MARBORDO ESTAS LIMO POR LA ELSENDILO. TIO KREAS LONGAN AREON, KIUN HOMOJ NE POVAS KONTROLI, BONŜANCE POR MURDOCK...
VROOOOO
ATENTON, ANDY! KAMIONOJ! NI KAŜIĜU!
79


ILI BREMSADAS!
NI SALTU, DO!
80.


?!
MI DIRUS, KE TIU KABLO VENAS DE LA RUINOJ!
81.



PROKSIMIĜU, ANDY! LA FONTO DE NUTRADO DE TIU REFLEKTILO VENAS DE LA RAVINO!
!
JEN ILIA ĈEFA KAŜEJO! NI ALPROKSIMIĜU TRE SILENTE.
NU, NU! JEN MALNOVA KONATO...
RADIO-ELSENDEJO! BONEGE!
82



ANDY, SABOTU LA KAMIONOJN. ONI BEZONAS MALFRUIGI ILIN JE DU AŬ TRI HOROJ.
MESAĜO PRIORITATA POR LA METROPOLA POLICO. MI RIPETAS: MESAĜO PRIORITATA POR LA METROPOLA POLICO!
CROSS! LAŬDON AL DIO! KIE VI ESTAS?
NORDE DE GLUTT LODGE. URĜE. ONI APLIKU LA PLANON 4.
LA BOMBAVIADILO?! BONE, MI HAVOS LA APROBON DE LORDO BASINGSTOKE POST UNU HORO...
BONE, NI DIREKTIĜOS AL LA FLUGHAVENO WICK. NI ALVENOS POST DU HOROJ, PROKSIMUME. ĜIS.
MI SABOTIS ĈIUJN KAMIONOJN. NUR LA MOTORCIKLO ESTAS UZEBLA.
ANTAŬEN! AL NIA LASTA AKTO!
83.




NI IRU MORTO-PUNKTE TIOM FOR, KIOM EBLAS. NE ESTAS KONVENE ATENTIGI MURDOCK-ON.
NUN!
VVROOOO
VROOOOOOOO
NI TUJ ALVENOS. MURDOCK VIVOS NUR KELKAJN PLIAJN MINUTOJN SUR LA TERO.
WICK 13


FLUGOFICIRO RODERICK McDERMOTT JE VIA SERVO, SINJORO. ONI BOMBOS LOKON, ĈU NE?
HOP! ROD McDERMOTT EK-FLUGIGAS AVIADILON TIEL. KIEN ONI IRU, DO?
IRU AL LA SUD-OKCIDENTO, AL GLUTT LODGE!
KIAM NI ALPROKSIMIĜOS AL LA LOKO, METU ĈI TIUJN VAKSAJN ORELŜTOP-ILOJN EN VIAJN ORELOJN, AMIKO!
EK, ROD! ONI BABILOS DUM LA FLUGADO!
AŬ VI EBLE SPERTOS HALUCINOJN!
HA HA HA! ONI NENIAM ANTAŬE DIRIS AL MI ION TIAN!
HO VE!
!
K7192
10 G


KION ONI FARU?
IRU PLI RAPIDE!
JEN LA RUINOJ! DETRUU ĈION!
KIO?! KIO ESTAS TIU DIABLAĴO?
NE PENSU PRI ILI, ROD! BOMBU LA ABSIDON!
WHAM



NUN, ROD, DIREKTU LA AVIADILON AL LA RAVINO, KIU TROVIĜAS NORDE DE LA RUINOJ!
EK, McDERMOTT, FALIGU ALIAN BOMBON!
BONAN VOJAĜON AL INFERO, MURDOCK!
JEN LA PARAŜUTISTOJ! LA ARMEO PURIGOS LA AREON. LA KOMISIO ESTIS PLENUMITA, McDERMOTT!
PRI KIO VI PENSAS?
PRI NENIO, ANDY. MI ESTAS LACEGA.


PASIS KELKAJ TAGOJ. NIAJ AMIKOJ PRETIĜAS POR FORIRI EN LONDONON.
LA AFERO ESTIS BRUA EN LONDONO, CARLAND. ONI DIRAS, KE EĈ LIA MOŜTO...
ĈU NI HALTU DUM MOMENTO, WINGFIELD?
R.I.P
MEDWENA ROSE
Mc GUIRE
1910 _ 1936
EK, WINGFIELD!
HO!
MAJSTRO, RIGARDU! LA MONSTRO DE LAGO NESS, JEN ĜI!
ANDY, ĈU VI NE HONTAS, KE VI FARAS TIAJN BLAGOJN JE VIA AĜO?
88!
MICHEL OLEFFE
OLIVIER GRENSON
The End